

## Enhavo

1	Grafikaj ĉapelaĵoj afiksas pazigrafiajn simbolojn: Blissymbolics ( <i>Mélanie Maradan</i> ).....	2
2	Pasintaj aranĝoj .....	4
2.1	Konferenco: superi landlimojn dum la “Belle Époque” .....	5
2.2.1	64-a Sesio de Internacia Kongresa Universitato .....	5
2.2.2	34-a Esperantologia Konferenco .....	5
2.2.3	Terminologia Forumo .....	6
2.2.4	ILEI-Simpozio.....	6
2.3	En Herzberg: pri Esperanto-muzeoj, bibliotekoj kaj arkivoj .....	7
3	Socilingvistika simpozio “Lingvo kaj urbo” 2012 en Berlin .....	8
4	Personoj.....	9
4.1	Forpasis <i>Magomet Izmajloviĉ Isajev</i> (1928-2011).....	9
4.2	<i>Ilona Koutny</i> – profesoro de UAM .....	9
4.3	<i>Velimir Piškorec</i> – orda profesoro .....	9
4.4	<i>Seán Ó Riain</i> en BBC.....	9
5	El universitatoj .....	10
5.1	5-a ciklo de Interlingvistikaj Studoj en Poznano .....	10
5.2	Universitato de Amsterdam: Novaĵoj de la interlingvistika katedro.....	10
5.3	En la Universitato de Hildesheim: prelego de <i>Klaus Schubert</i> .....	12
5.4	Universitataj laboraĵoj .....	12
5.4.1	Pri eŭropa lingvopolitiko: <i>Donncha Ó Riain</i> .....	12
5.4.2	Pri cenzuro kaj Esperanto-movado en Rusio kaj USSR: <i>Dmitrij Vlasov</i> .....	12
6	Du festlibroj.....	13
6.1	“Florilegium Interlinguisticum” – Festlibro por <i>Detlev Blanke</i> .....	13
6.2	“Instrui – Dokumenti – Organizi” – Festlibro por <i>Claude Gacond</i> .....	15
7	“Modernaj Teknologioj por Esperanto” .....	17
8	Aktoj de GIL, 18-a kajero .....	19
9	“Esperantologio – Esperanto Studies” (EES) N-ro 5 .....	20
10	Bibliotekoj.....	21
10.1	Bavara Ŝtata Biblioteko: Interlingvistikaj ekspozicio kaj kolokvo.....	21
10.2	IEMW: Literatura Mondo estas legebla en interreto! .....	21
11	Leksikografio kaj terminologio .....	22
11.1	Frazaro en la reto.....	22
11.2	Terminaroj ekde 1980 – lasta eldono de <i>Jerome Vachey</i> .....	23
11.3	UEA – membro en Infoterm kaj ISO/TC 37 .....	23
11.4	Retaj vortaroj.....	23
12	<i>Victor Ginsburgh/Shlomo Weber</i> : “How many languages do we need?”.....	23

# 1 Grafikaj ĉapelaĵoj afiksas pazigrafiajn simbolojn: *Blissymbolics*

Mélanie Maradan

*Simpla sistemo de 100 logikaj bildsimilaj simboloj, kiuj funkcias por ĉiuj lingvoj kaj legeblas kvazaŭ  $1 + 2 = 3$ . Ĝi tajpeblas, printeblas kaj uzeblas por internacia komunikado, komerco, industrio kaj sciencoj. Ĝi postulas facilajn semantikon, logikon kaj etikon, kiujn eĉ infanoj kapablas lerni por solvi siajn problemojn<sup>1</sup>.*

Laŭ *Charles Kasiel Bliss*, ĥemiista inĝeniero kaj esploranto, naskita en 1897 in Czernowitz (Aŭstrio-Hungario, nuntempe Ukrainio), unu el la malĝuigaj flankoj de internacia lingvo kiel ekzemple Esperanto estas, ke homoj ĝenerale ne aparte emas lerni fremdan lingvon. Ili multflanke preferas esprimi sin pere de sia hejma lingvo.

Oni tamen bezonas komunan lingvan komunikilon, nelaste kadre de sciencoj. Efektive, fakaj artikoloj aperas en diversaj lingvoj, bremsantaj sciencajn esplorojn kaj evoluojn. Menciindaj estas la kvazaŭ universalaj fakesprimoj, kiuj legeblas en la plejmulto de la mondaj kulturoj, ekzemple  $H_2O$  (anstataŭ *akvo* en Esperanto aŭ naciaj esprimoj kiel *Wasser, water, eau* k.s.). Kunmeti surbaze de 100 facile lerneblaj karakteroj tutmondan skribon por scienca agado, kiu taŭgus por ĉiuj gepatraj lingvoj, jen la defio, kiun al si starigis *Mr. Symbol Man* (s-ro Simbolo) en la 1940-aj jaroj.

Post 7 jaroj da kaprompado kaj malnetaĵoj, en la jaro 1949 C. K. Bliss publikigis sian pazigrafion *Blissymbolics* (ankaŭ nomita “blisa skribo” aŭ simple “Bliss”). Anstataŭ uzi literojn de la latina alfabeto, kiuj ne entenas signifon en si mem, kaj inspirite de ĉinaj karakteroj, Bliss kreis aron da simboloj. En la unua versio ekzistis ĉirkaŭ 100 bliskarakteroj (bazaj simboloj aŭ radikoj), el kiuj eblis kreeme kaj multflanke libere derivi pliajn blisvortojn. Kompreneble, ĉar la blisa skribo aĝas proksimume 60 jarojn, uziĝas nuntempe pliaj radikoj. Oni nur komparu tiun fenomenon kun la evoluo de Esperanto, kiu origine (1887, *Unua Libro*) ampleksis proksimume 900 radikojn, post ĉirkaŭ du jardekoj (1905, *Fundamento de Esperanto*) proksimume trifoje pli kaj post iom pli ol 60 jaroj (1954, *Plena Vortaro*) jam preskaŭ atingis la kvanton de 8000 radikoj.

En la jaro 2004, ĉirkaŭ 900 bliskarakteroj estis agnoskitaj<sup>2</sup>. La oficialan vortaron jam eniris pli ol 4600 blisvortoj, kiuj entenas unu aŭ plurajn bliskarakterojn.

Bedaŭrinde, krom la intereso flanke de pluraj personoj de sia tempo, Bliss ne sukcesis konvinki la homaron por uzi sian simplan sistemon. Nur dudekon da jaroj poste, kanada terapiisto ekuzis la skribon kun infanoj suferantaj de fizikaj malkapabloj.

Tiel la pazigrafio pli kaj pli iĝis sistemo por *plibonigita kaj alternativa komunikado* (angle *Augmentative and Alternative Communication AAC*, germane *Unterstützte Kommunikation UK*).

La blisan skribon ĉefe uzas neparolkapablaj homoj, ĉu kiel ponton al la lingvo parolata en sia komunumo, ĉu kiel sendependan lingvon. En la realo ekzistas plej diversaj celgrupoj, por kiuj

---

<sup>1</sup> Laŭ Bliss, Charles Kasiel. 1949 (1965). *Semantography (Blissymbolics)*. Second Enlarged Edition. Sydney, Australia: Semantography (Blissymbolics) Publications, 1949 (1965). 882 p.

<sup>2</sup> Agnoskita de *Blissymbolics Communication International (BCI)*.


oni provis utiligi la blisan skribon, interalie homoj kiuj suferas je afazio, cerba paralizo, trisomeco de la kromosomo 21 (sindromo de Down) aŭ cerba traŭmato. Ankaŭ por homoj sen malkapabloj oni provis proponi la skribon, nelaste por infanoj, kiuj ankoraŭ ne kapablas paroli aŭ legi. Tio, kio estas simple komprenebla kaj utila por homoj kun malkapabloj, estas same utila por homoj sen malkapabloj. Samkiel Esperanto kaj aliaj planlingvoj, la blisa skribo faciligas pripensadon pri ajna gepatra lingvo kaj lernadon de plia lingvo.

Pri la estonteco de la blisa skribo zorgas *Blissymbolics Communication International* (BCI), tutmonda organizaĵo, nuntempe translokiĝanta de Nordameriko al Skandinavio. Ĝi havas membrojn en pli ol 33 landoj, ĝenerale renkontiĝas unufoje jare ie en la mondo (laste interalie en Oslo, Montrealo, Dundee kaj Düsseldorf) kaj ĝia blisvortaro estas plurlingva. Dum internaciaj renkontiĝoj oni pridiskutas kaj novajn blisvortojn, kiujn oni bezonas por lernantoj, kaj projektojn, nelaste komputilajn (ekz. Unikodigon) por antaŭenigi la skribon.


### LERNU PLI PRI BLISSYMBOLICS:

[www.blissymbolics.org](http://www.blissymbolics.org) (angle) – **Blissymbolics Communication International (BCI)**: tutmonda organizaĵo, ĝeneralaj informoj pri la blisa skribo (inkluzive ligilo al kurso)  
<http://www.blissonline.se/> (angle, finne kaj svede – baldaŭ france) – **BlissOnline™**: traserĉado de la oficiala vortaro de BCI


### Ilustraĵo 1 – Pozicio de blisvortoj (plej gravas la ĉiela kaj grunda linioj)



### Ilustraĵo 2 – Formado de blisvortoj el la semantika familio “dorm-” (ekzemploj)



### Ilustraĵo 3 – Ekzemploj de blisindikiloj (komparo kun afiksoj de Esperanto)



([melmaradan@yahoo.fr](mailto:melmaradan@yahoo.fr))

## 2 Pasintaj aranĝoj

### 2.1 Konferenco: superi landlimojn dum la *Belle Époque*

Kiel ni nur nun eksciis, en la institucio *Mundaneum* en Mons (Belgio) la 20-an kaj 21-an de majo 2010 okazis kolokvo kun la kadra temo „Transcending Boundaries in Europe in the Period of the Belle Époque: Organizing Knowledge, Mobilizing Networks, and Effecting Social Change”<sup>3</sup>.

Dum tiu aranĝo oni prezentis kelkajn prelegojn, interesajn por interlingvistoj:

*Markus Krajewski (Bauhaus-Universität Weimar)*

Organising a Global Idiom: Esperanto, Ido and the World Auxiliary Language Movement before WWI

*Fabian de Kloe (Maastricht University)*

Beyond Babel: Louis Couturat (1868-1914) and the Pursuit of an International Scientific Language

*Mikel Breitenstein (University of Wisconsin—Milwaukee)*

Unity Through Language: BASIC English by C. K. Ogden

*Daniel Laqua (Northumbria University, Newcastle, UK)*

‘Scientific Pacifism’ in the Belle Époque: Alfred Hermann Fried’s Efforts to Promote Peace across National Borders

<sup>3</sup> Vidu <http://www.mundaneum.be/index.asp?ID=622> .

## 2.2 Fakaj aranĝoj kadre de la 96-a UK en Kopenhago

Kiel kutime ankaŭ dum la ĉi-jara Universala Kongreso en Kopenhago (23.-30. Julio) okazis multaj fakaj aranĝoj. Ni povas mencii nur la ĉefajn, jene:

### 2.2.1 64-a Sesio de Internacia Kongresa Universitato

La rektoro de la 64-a sesio de la tradicia IKU estis la matematikisto kaj esperantologo *prof. d-ro Christer Kiselman*.

Oni prezentis jenajn prelegojn:

Amri Wandel\*: *SETI post 50 jaroj – astrobiologio kaj la serĉado de ekstertera inteligenteco*

Eva Boyadzhieva\*: *Oksigeno – utila kaj danĝera por la homo*

Tsvi Sadan\*: *La “reviviĝo” de la hebrea sen mitoj*

Erik Høg: *La profundo de la ĉielo – kredo kaj scio dum 2500 jaroj*

Kadoja Hidenori: *Vikinga epoko, naciismo kaj historiografio*

José Antonio Vergara: *Epidemio de HIV – aidoso kiel minaco*

Davide Astori: *La Zamenhofa revo inter lingvistika kaj religia planado*

Věra Barandovská-Frank: *Interlingvistika laboro de Otto Jespersen*

Jacob Nordfalk: *Maŝintradukado – kiel ĝi funkcias, kion ĝi kapablas*

(\*Tiuj prelegoj ankaŭ estis parto de la kleriga sistemo de AIS).

La volumo haveblas ĉe UEA:

**Wandel, Amri (2011, Red.): *Internacia Kongresa Universitato. 64-a Sesio. Kopenhago, Danio, 23 – 30 julio 2011, Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 137 p.***

### 2.2.2 34-a Esperantologia Konferenco

Kadre de la tradicia Esperantologia Konferenco (preparita kaj gvidita de *Detlev Blanke*), post enkondukaj vortoj de *Humphrey Tonkin*, direktoro de CED, oni prezentis jenajn prelegojn:

*Jens Stengard Larsen*

“Rasmus Rask kaj Otto Jespersen – du danaj lingvistoj kun interlingvistika signifo”

*Christer Kiselman*

„Paul Neergaard – sempatologo kaj esperantologo”

*Davide Astori*

Daniele Marignoni (1846-1910) – la homo, kiu “enkondukis la lingvon Esperanto en Italio”

*Otto Bernt Prytz*

Fenditaj frazoj: ĉu uzindaj en Esperanto?

*Marek Blahuš*

Cifereca prilaboro de la Zamenhofaj adresaroj

### **2.2.3 Terminologia Forumo**

La Terminologiaj Forumoj kadre de la UK-oj havas la celon helpi la spertinterŝanĝon inter fakvortaristoj kaj prezenti novajn verkojn kaj diskutigi la problemojn ligitajn al ili.

Aparte gravas konscii la fakvortaristojn pri la principoj de terminologio-normigado, fiksitaj en la Teknika Komitato 37 de Internacia Organizaĵo pri Normigado (International Organization for Standardization, ISO).

La ĉi-jaran Forumon organizis E@I (*Marek Blahuš*) aktive subtenata de la komisiito de UEA por rilatoj kun Infoterm kaj ISO/TC 37, *Mélanie Maradan* (ankaŭ vidu “Esperanto aktuell” 3/2011 kaj ĉapitro 12.2). La kadra temo de la Forumo estis „Faka lingvo en la Interreto“.

Oni prezentis jenajn prelegojn:

*Mélanie Maradan*

Terminologia normigado kadre de la terminologia komitato TC 37 de ISO

*Christer Kiselman*

Streĉiteco inter planita/planata lingvo kaj nature parolata lingvo

*Amri Wandel*

Kiel gugli por trovi vian blogon?

*Eckhard Bick*

Tradukcela terminologio - terminologiaj aspektoj de la WikiTrans-projekto

*Marek Blahuš*

Kelkaj interretaj projektoj rilataj al terminologio en Esperanto

(La ĝeneralan diskuton gvidis *Mélanie Maradan*)

### **2.2.4 ILEI-Simpozio**

Post sia konferenco en la Universitato de Kopenhago (17.-23.7.2011) ILEI okazigis sciencan simpozion pri la temo „Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado. La simpozion kunorganizis CED kaj la Universitato. Prelegojn oni prezentis en la angla (en) kaj en Esperanto (eo). La simpozion gvidis *prof. Duncan Charters*. Oni prezentis jenajn prelegojn:

*Frans Gregersen*

Defioj kaj perspektivoj por lingva politiko en Eŭropo. Danio kiel ekzemplo (en)

*Humphrey Tonkin*

Lingvoj kaj la komunika fendo en la scienco (eo)

*Robert Phillipson*

Subtenado de diverseco en lingvoj de klerigado (en)

*Detlev Blanke /Wera Blanke*

Faklingva komunikado en Esperanto (eo)

*Sabine Fiedler*

Scienca komunikado kaj lingvafrankao (eo)

*László Marác*

Instrumentaro por transnacia komunikado en Eŭropo: komparo inter manieroj de komunikado en multlingva Eŭropo (en)

*Amri Wandel*

Lingva egaleco en la scienco sub la ombro de la angla (eo)

*Mark Fettes*

Lingvo, scienco, edukado en ekologia perspektivo (en)

*Nicolau Dols Salas*

Alprenplanado de malpli uzata lingvo en multlingva socio (eo)

*Davide Astori*

Kia(j) lingvo(j) por scienco? (eo)

*Marek Blahuš*

Kontribuo de komputila lingvistiko al solvado de lingvaj problemoj en scienca komunikado kaj edukado (eo)

*José Antonio Vergara*

Priscienca komunikado en multlingva mondo: al demokratiaj sciosocioj

La resumoj de la prelegoj kaj ampleksa raporto pri la ILEI-simpozio aperis en “Internacia Pedagogia Revuo” 41(2011)3, p. 4-16.

Oni planas publikigi la prelegojn dulinge.

### **2.3 En Herzberg: pri Esperanto-muzeoj, bibliotekoj kaj arkivoj**

Kiel konate la urbo Herzberg (pron. Hercberg) ĉe la mezgermana Harz-Montaro (pron. Harc) internacie famiĝis pro eksterordinara agado per kaj por Esperanto. Pro tio ĝi portas la oficialan nomon laŭ decido de la urba estraro „Herzberg – die Esperanto-Stadt“ (Hercberg – la Esperanto-urbo).

Al la multflanka agado de la tie laboranta “Interkultura Centro Herzberg” ICH), kiun motoras aparte Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy (ICH, vidu:

<http://www.ic-herzberg.de/esperanto/index.html> kaj <http://esperanto-urbo.de>) apartenas instruado, kunlaboro kun alilandaj partneroj en la kadro de EU-programoj, kulturaj kaj alispecaj aranĝoj. De tempo al tempo tie ankaŭ okazas fakaj aranĝoj, seminarioj, kolokvoj aŭ simpozioj kun enlandaj kaj eksterlandaj fakuloj.

La 30a-n de septembro 2011 ICH okazigis aranĝon pri Esperanto-muzeoj, bibliotekoj kaj arkivoj.

Pri la kadra temo oni prezentis jenajn prelegojn:

*Detlev Blanke*

Biblioteko kaj arkivo de familio Blanke – kun aparta konsidero de la kontraktaj rilatoj al la Federacia Arkivo de Germanio

*Elzbieta Maria Karczewska*

La Podlaĥia biblioteko

*Peter Zilvar/Zsófia Kóródy*

La biblioteko kaj gazetarkivo de Interkultura Centro Herzberg (ICH)

*Lee Jung-kee (pere de Lee Sang)*

Seula Esperanto-Kulturdomo

*Nemes Anikó (pere de Zsófia Kóródy)*

Novajoj el la Fajszki-Kolektaĵo en Budapeŝto

*Smail Grbo*

Prezento de la propra biblioteko

*François Lo Jacomo*

60-jara Greziljono: novaj projektoj de malnova kultura centro

*Peter Zilvar/Zsófia Kóródy*

Kelkaj Esperanto-muzeoj, bibliotekoj kaj kulturcentroj

Ekster la temo:

*Toon Witkam*

Alparoli zorgobotojn esperante

*Stefan MacGill*

ILEI kaj la ‘Projekto Esperanto 125’

*Mélanie Maradan*

Terminologia normigado, ISO

### **3 Socilingvistika simpozio “Lingvo kaj urbo” 2012 en Berlin**

Inter 22-a ĝis 24-a de aŭgusto 2012 en la Libera Universitato Berlin (Freie Universität Berlin) okazos socilingvistika kolokvo kun la kadra temo “Lingvo kaj urbo.

Informojn donas Matthias Hüning ([sociolinguistics-symposium@fu-berlin.de](mailto:sociolinguistics-symposium@fu-berlin.de)).

Oni ankaŭ rigardu: <http://www.sociolinguistics-symposium-2012.de/>



## 4 Personoj

### 4.1 Forpasis *Magomet Izmajloviĉ Isajev (1928-2011)*

La 20-an de junio 2011 en Moskvo forpasis la sovetunia kaj ruslanda lingvisto, profesoro *Magomet Izmajloviĉ Isajev (1928-2011)*, doktoro de filologio, akademiano de la Ruslanda Akademio de Natursciencoj.

Li estis grava fakulo pri kaŭkazaj lingvoj (precipe pri la oseta lingvo), pri socilingvistiko kaj pri interlingvistiko.

Esperantisto ekde 1956, la lingvisto verkis diversajn sciencajn librojn kaj artikolojn pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj. Li ofte menciis Esperanton en siaj verkoj pri lingvaj problemoj de nacioj, pri kiuj li estis specialisto. Magomet Isajev estis prezidanto de la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetiaj Esperantistoj ĉe Unio de Sovetiaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando (1971-1979), fakte kiel posteulo de Evgenij Bokarev (1904-1971), kaj de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, 1979-1989). Dum tiu tempo per sia scienca prestiĝo li multe helpis la sovetian Esperanto-movadon kaj subtenis interlingvistikan agadaon en aliaj landoj.

M. Isajev ankaŭ prezidis la doĵenan konsilantaron de la Moskva oseta komunumo. Li estos sepultita en la Aleo de Gloro en Vladikavkaz, la ĉefurbo de la respubliko Norda Osetio.

(En IpI 65 ( 2/2008) ni amplekse informis pri la forpasinto okaze de lia 80-jariĝo kaj aldonis liston de liaj interlingvistike gravaj verkoj. Ni krome atentigas denove pri la biografia artikolo de Isajev en Rusia Esperanto-Gazeto (REGO), n-ro 1 (14) 2003, p. 3-4, n-ro 2 (15), 2003, p. 7-10.)

### 4.2 *Ilona Koutny* – profesoro de UAM

La konata hungara interlingvistino *d-ro habil. Ilona Koutny*, kiu laboras en la Adam-Mickiewicz-Universitato (UAM) de Poznań, la 1-an de julio 2011 estis nomumita ‘profesoro’ (de UAM). Ŝi ne nur konatiĝis pro multaj publikaĵoj kaj prelegoj sed ĉefe pro la Internaciaj Interlingvistikaj Studoj, kiujn ŝi gvidadas pli ol jardekon (vidu la raporton sub 5.1).

*Prof. Koutny* estas unu el la plej konataj disĉiploj de *István Szerdahelyi*. La rektoro de UAM ŝin distingis pro ŝia organiza kaj didaktika laboro lige al la Internaciaj Interlingvistikaj Studoj.

### 4.3 *Velimir Piškorec* – orda profesoro

La zagreba germanisto kaj interlingvistiko (Universitato de Zagrebo/Kroatio), *d-ro Velimir Piškorec*, la 13-an de septembro 2011 estis nomumita “orda profesoro pri filologio”.

*Prof. Piškorec* lastatempe publikigis kelkajn gravajn interlingvistikajn studojn en kaj ekster la publikaĵoj de Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL), en kiu li membras.

### 4.4 *Seán Ó Riain* en BBC

British Council en BBC antaŭ nelonge prezentis 10-minutan intervjuon en la angla kun la irlanda diplomato kaj lingvopolitikisto, *d-ro Seán Ó Riain*. La intervjuo realiĝis kadre de la projekto “lingvoambasadoroj” (language ambassadors) por la retejo [www.poliglotti4.eu](http://www.poliglotti4.eu).

La programo aperis okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj. *D-ro Ó Riain* sukcesis ankaŭ iom paroli pri Esperanto, kaj aparte pri ties lernfaciligaj ecoj.

Oni povas aŭskulti la intervjuon ĉe <http://edukado.net/biblioteko/filmejo?iid=76>

## 5 El universitatoj

### 5.1 5-a ciklo de Interlingvistikaj Studoj en Poznano

Nova grupo komencis 3-jaran studon ĉe la Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando).

La jam 5-a ciklo de la Studoj komenciĝis la 17-an de septembro 2011. La unuan prelegserion partoprenis 19 studemuloj el 10 landoj (5 el Brazilo, po 3 el Hungario kaj Svislando, 2 el Pollando, po unu el Francio, Germanio, Italio, Hispanio, Rusio kaj Usono).

La studoj povis starti danke al la stipendioj de ESF kaj de ILEI-UEA, kaj danke al la entuziasmo de la partoprenantoj, speciale de la brazila grupo. La kursanoj povis partopreni dum la sekvaj 4 tagoj en 4 intensaj kursoj.

*Prof. John Wells* prezentis diversajn sonsistemojn en la mondo kaj pli detale la fonetikon de esperanto.

*D-rino Věra Barandovská-Frank* traktis interlingvistikon, de la internacia lingvosituacio tra la etnaj interlingvoj kaj piĝinoj ĝis planlingvoj.

*Prof. Aleksander Melnikov* diskutis la nocion kulturo kaj speciale la terenojn de Esperanto-kulturo kaj analizis la fonajn sciojn de tipa esperantisto.

*Lidia Ligeza* al la ĉeestantoj pliproksimigis la poezion kaj *Tomasz Chmielik* la prozon de la unua periodo de la Esperanta literaturo. Ne mankis diskutoj kaj reagoj.

Paralele al la sesio okazis ekzamenoj de 4 gestudentoj finintaj la studadon kaj de 10 partoprenantoj de la unujara instruista trejnado (komuna entrepreno de la Interlingvistikaj Studoj kaj ILEI kun la kontribuo de Edukado.net). En la unua grupo defendis sian laboraĵon *Marija Jerkovič* (kroataj lernolibroj de Esperanto kaj iliaj verkistoj), *Tea Radovanovič* (kroata literaturo, tradukita al Esperanto), *Sean Healy* (maŝina tradukado kaj Esperanto), *Petro Balaž* (moderna informado kaj DVD kreita ĉe E@I).

La interlingvistikan sesion sekvis Interlingvistika Simpozio (22-23.09.2011) „Interlingvistiko kaj esperantologio antaŭ la defio de la 21-a jarcento“ same en la Novfilologia Fakultato, organizita la 2-an fojon (la antaŭa okazis dum la dekjarigo de la Studoj en 2008). Partoprenis ĝin kvindeko da homoj el 15 landoj: novaj kaj malnovaj gestudentoj, la alvenintaj instruistoj kaj kelkaj aliaj aliĝintoj.

La dudeko da prelegoj okazis en 4 sekcioj: lingvistiko, metodiko, movado kaj literaturo. Fine de ĉiuj sekcioj okazis diskutoj pri la defioj al la donita tereno.

Kiel kutime la tuton finis la kultura aranĝo Arkones semajnfine kun aldonaj prelegoj, spektakloj kaj koncertoj.

Gvidis la tuton *prof. d-rino Ilona Koutny*.

(laŭ informoj de *Ilona Koutny*)

### 5.2 Universitato de Amsterdam: Novaĵoj de *Wim Jansen*

Post la antaŭnelonga ĉesigo de la instruado de interlingvistiko kaj esperantologio en Eötvös-Loránd Universitato Budapeŝt nuntempe katedro, instruanta la menciitajn fakojn, ekzistas nur en la Universitato de Amsterdam/NL (UvA), kiun gvidas *prof. d-ro Wim Jansen*.

Pri sia instrulaboro, pri sciencaj esploroj kaj studentaj aktivaĵoj prof. Jansen regule informadas en sia perioda informilo “**La Amsterdama Katedro**“ (ekde 2008). Tiu-ĉi informilo ne nur prezentas multajn informojn, sed ankaŭ povus stimuli aliajn fakulojn, sekvi la tie prezentatajn spertojn kaj utiligi ilin.

Ni prenu kelkajn informojn el la kajeroj 15-a (julio 2011) kaj 16-a (oktobro 2011).

La 25-an de junio 2011 Wim Jansen **prelegis en la Universitato de Milano** pri „*Separating semantics from syntax in Esperanto. A mental struggle in the heart of Europe to get to grips with some un-European features of the language*“.

La 4-an kaj 5-an de julio 2011 en Amsterdam okazis konferenco en la kadro de **la projekto “Toolkit”**<sup>4</sup>. Tie Wim Jansen prelegis pri la angla aŭ Esperanto kiel Lingvo Franka. *Hans Erasmus* prelegis pri la maniero organizi tuteŭropan projekton por serioze studi la lingvoproblemon en EU. Ĉe la projekto kunlaboras 9 universitatoj, inter ili tiu de Amsterdam.

La 6-an de septembro 2011 komenciĝis **nova kurso pri interlingvistiko** kun 14 studentoj.

Komence de septembro 2011 *Detlev Blanke* sendis nome de *Gesellschaft für Interlinguistik* stokon da libroj donace al la **lingvistika biblioteko** de UvA.

La donaco, kiu konsistis el 17 volumoj enhavantaj la aktojn de la konferencoj de GIL de 1995 ĝis hodiaŭ kaj el 14 pliaj faklibroj pri interlingvistiko, estis ricevita de la bibliotekisto, kiu respondis per dankesprimo, aldonante “*We are greatly interested in Esperanto, so they [la libroj] are a welcome addition to our collection*”.

Laŭ invito de la **Studenta Asocio pri Internaciaj Rilatoj** (SIB) Wim Jansen prelegos la 1-an de novembro 2011 en Utrecht nederlandlingve pri la temo *Lingvaj Problemoj en Eŭropa Unio*.

La 22-an de januaro 2012, kadre de **publika prelegaro** de la universitato Wim Jansen prelegos pri „*Esperanto: planlingvo kaj lingvoplanado sub lupeo*“.

De la 9a ĝis la 11-a de majo 2012 okazos konferenco en Lunteren, organizata de **la nederlanda asocio pri aplikita lingvistiko** Anéla.

Ene de tiu konferenco okazos kolokvo pri Internacia Komunikado en Eŭropo. *László Marác*, hungara lingvisto laboranta en UvA, surbaze de artikolo kiun li verkis kune kun Wim Jansen, prelegos pri la temo *Comparing ELF and Esperanto as a lingua franca for scientific communication*.

**Pri la estonteco de la katedro** prof. Jansen informas, ke lia kontrakto finiĝos la 1-an de septembro 2013 (pro atingo de la aĝlimo). Estas dezirinde, ke oni trovu taŭgan posteulon por ke ebligi daŭrigon de la instruado. Necesas certigi la financon bazon. Estus domaĝe, se ankaŭ tiu ĉi pozicio, certe ne facile akirita en la universitata scienca medio, same malaperus kiel aliaj (ekz. en Budapeŝto).

Interesiĝantoj, do fakuloj, dezirantaj ricevi la bultenon „La Amsterdama Katedro“ direktiĝu al: [wimjansen@casema.nl](mailto:wimjansen@casema.nl).

---

<sup>4</sup> Vd. [www.toolkit-online.eu](http://www.toolkit-online.eu) .

### 5.3 En la Universitato Hildesheim: prelego de *Klaus Schubert*

Kadre de esplorkolokvo en la faka sekcio 3 (Scienco pri Lingvoj kaj Informadiko) de la germana Universitato de Hildesheim *prof. d-ro. habil. Klaus Schubert* la 7-an de junio 2011 prelegis germane pri la temo „De Aristotelo al la semantika reto – kaj kion eblas lerni de la vortfarado de Esperanto”.

Klaus Schubert, i.a. ankaŭ konata interlingvisto kaj esperantologo, estas afergvida direktoro de la “Instituto pri Tradukscienco kaj Faka Komunikado” de la menciita universitato.

### 5.4 Universitataj laboraĵoj

#### 5.4.1 Pri eŭropa lingvopolitiko: *Donncha Ó Riain*

*Ó Riain, Donncha* (2008-2010): Unity and/or diversity: the evolving use of language within principal EU institutions. (Laboraĵo por atingi la gradon de “Master of European Legal Studies”). Université Nancy 2 (European Institute of Public Administration – EIPA, Luxembourg/ European Centre for Judges and Lawyers). 70 p.<sup>5</sup>

#### 5.4.2 Pri cenzuro kaj Esperanto-movado en Rusio kaj USSR: *Dmitrij Vlasov*

*Vlasov, Dmitrij V.* (2011): Ĕsperanto: polveka cenzury. Razvitie Ĕsperanto-dviŝeniĵa i ego ŝurnalistiki v uslovijach cenzury v Rossijskoj imperii i SSSR (1887-1938 gg.). Moskva: Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato, ŝurnalistika fakultato, 182 p.

La teksto ankaŭ aperis samtitole kiel libro. Danke al Dimo Ŝevĉenko ni jen povas prezenti la esperantan titolon kaj enhavon:

*Vlasov, Dmitrij* (2011): Esperanto: duonjarcento sub la cenzuro. Evoluo de la Esperanto-movado kaj ĝia ŝurnalistiko sub cenzuro en la Rusia Imperio kaj USSR (1887–1938). Monografio. Moskvo: Impeto, 184 paĝoj. ISBN 978-5-7161-0229-3

Enhavo:

- Enkonduko.
1. Apero kaj evoluo de la esperantista movado kaj ĝia gazetaro en la Rusia Imperio (1887– 1917).
    - 1.1. Batalo por agnoski Esperanton kiel lingvon antaŭ apero de la unua Esperanto – gazeto (1889).
      - 1.2. Lev Tolstoj kaj la Esperanto-gazetaro.
      - 1.3. Evoluo de la rusia Esperanto-ŝurnalistiko ĝis oktobro de 1917.
        - 1.3.1. Specifaĵoj de la rusia Esperantista gazetaro ĉe interjarcenta limo.
        - 1.3.2. Evoluo de Esperanto-periodaĵoj en 1905–1913.
        - 1.3.3. Esperantista movado antaŭ kaj dum la Unua Mondmilito.
    2. Batalo de la esperantista movado kaj ĝia gazetaro, statuso de la internacia lingvo (1917 – 1938).
      - 2.1. Fondo de Sovetlanda Esperantista Unio kaj la batalo kontraŭ neŭtraleco en la esperantismo.

---

<sup>5</sup> La laboraĵo estas defendita en Nancy, la verkado okazis sub aŭspicio de EIPA en Luksemburgio.

- 2.2. Eduko de klaskonscio: de memcenzurado al plena kontrolado de internacia korespondado en Esperanto.
- 2.3. Kritiko kaj interna mempurigado de SEU.
- 2.4. Cenzuro – unu el la funkcioj de la Centra Komitato de SEU.
- 2.5. Specifaĵoj de la sovetia Esperanto-movado kaj ĝia krizo meze de la 1930-aj jaroj.
- 2.6. Likvido de la sovetia Esperanto-movado en 1937–1938.  
Postparolo  
Literaturo  
Suplementoj: tabeloj de periodaĵoj.

